ADORVIZITO AL LA MONTO KOUYA-SAN

Mi ascendis profunden en la monto Kouya, kie estas plenplena de sankteco. Tie la lumo de budhismo neniam estingiĝas. La areo plenas de loĝejoj por bonzoj kaj adeptoj, de vico da temploj, tegitaj per tegoloj. Printempaj floroj, ekmalfermintaj kvazaŭ momenta iluminiĝo, aromas en nebuleta kvieta ĉielo, kaj sonoj el sonorilo kaj el tintiloj penetras en mian korpon, voĉo de simioj kaj pepado de birdoj ŝajnas, kvazaŭ ili disŝirus mian intestaron. Mi, adorante kun kvieta koro la maŭzoleon, starante dume ĉe la kripto, meditis profunde pri diversaj aferoj. Ĉi tie kolektiĝis multe da memoraĵoj – inkluzive de la haroj de miaj prapatroj kaj la ostoj de karaj proksimuloj. Tion pensate, mi ne povis deteni de senĉesaj larmoj, ne forviŝeblaj per mia maniko, kaj versis jene:

Sopiras mi pasie
Pri paĉjo, pri panjo, -
Fazana krio.
[Titi haha no sikirini koisi kizi no koe]

Printempo, 1688